

La akuzativa funkcio
diferenco inter esperanto kaj la naturalista skolo
Claude Gacond, 211-a radioprelego, 1967.10.25 & 1967.10.28

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ofte en mezkleraj medioj oni asertas, ke ĉar la franca lingvo ne posedas akuzativon, tiam esperanto ne devus posedi akuzativon. La pasintan semajnon ni vidis, ke esperanto havas tri metodojn por esprimi la proceson, kiu distingas la subjekton de la objekto. Ĝi povas uzi la markon **n**, ĝi povas uzi **prepozicion**, ĝi okupiĝas pri la loko en propozicio.

A.- La franca, kiel ĉiuj lingvoj de la homoj, devas distingi la objekton de la subjekto. Se en la franca gramatiko oni ne parolas pri akuzativo, tio ne signifas, ke en la franca ne ekzistas la akuzativa funkcio.

Cl.- Hodiaŭ por klarigi la sintenon de Zamenhof rilate al la problemo Lingvo internacia, ni volas unue fari kelkajn komparojn inter esperanto kaj la franca, kaj poste inter esperanto kaj **Interlingua**, la plej tipa planlingvo de la naturalisma skolo.

A.- Ni prenu frazon, kie la vortoj de ambaŭ lingvoj havas grandan similecon. **Paŭl kritikas Karlon** fariĝas en la franca **Paul critique Charles**. En la franca, kiel en esperanto, kiam oni diras **Paŭl kritikas Karl** la akuzativa funkcio estas indikata per la loko. La ordo estas : nominativo verbo akuzativo.

Cl.- Nun ni anstataŭos unu el tiuj nomoj per pronomo. Tio fariĝas en esperanto : **Li kritikas Karlon** aŭ **Paŭl kritikas lin**. La pronomo povas resti en la loko antaŭe okupita de la nomo. Ni vidu en la franca.

A.- **Il critique Charles**.

Cl.- **Il** estas egala al **li** kaj restas, kie estis la nomo **Paul**.

A.- **Paul le critique**.

Cl.- Ni konstatas, ke oni nek povas diri **Paul critique il** nek **Paul critique le**. Unue en la akuzativo la pronomo ricevas alian lokiĝon. Ĝi troviĝas inter la nominativo kaj la verbo. Due la nominativo **il** fariĝas **le** en la akuzativa formo. Do okazas fleksio. Oni rimarkas, ke en la franca, kiu, laŭ la diroj de kelkaj mezkleruloj, ne havas akuzativon, fakte, la akuzativa funkcio, por sin esprimi, uzas tute arbitrajn rimedojn.

A.- La kaŭzo de la translokiĝo de la pronomo **le** estas facile trovebla. La vorto **le** en la franca indikas ankaŭ la **virgenran difinitan artikolon**. Do **le** pronomo devas iri antaŭ la verbo por eviti konfuzon kun **le** artikolo.

Cl.- Ni troviĝas antaŭ la fenomeno de troa signa simpligo, kiu okazigas komplikigon en la esprimado. Unu sola vorto **le** reprezentas du absolute malsimilajn gramatikajn rolojn. Pro tio dekoj da absolute arbitraj leĝoj devis esti iom post iom kreitaj por eviti miskomprenojn.

A.- Por Zamenhof tio en la lingvo internacia ne povas esti, ĉar tiam nur la personoj apartenantaj al tiu lingvofamilio sentus sin hejme en la internacia idiomato. Tion ne pensas la aŭtoroj de **Interlingua**, la internacia lingvo nun en la modo en la kontraŭesperantaj medioj.

Cl.- Interlingua estas hodiaŭ la plej tipa reprezentanto de la planlingvoj apartenantaj al la **naturalisma** skolo. Tiu skolo kredas, ke en internacia lingvo devas aperi nur vortoj ekzistantaj en naciaj lingvoj. Vorto kreita estas monstraĵo, kaj lingvo kun tiaj monstraĵoj estas barbaraĵo. Eperanto estas por ili lingvaĉo nerespektinda.

La akuzativa funkcio
diferenco inter esperanto kaj la naturalista skolo
Claude Gacond, 211-a radioprelego, 1967.10.25 & 1967.10.28

A.- Kontraŭe al Zamenhof la aŭtoroj de Interlingua pli interesiĝis al la morfologio, ol al la sintakso. En tio ili estas la heredantoj de la lingvistoj de la fino de la pasinta jarcento. Ili pli interesiĝas al la eksteraĵo de la lingvo-fenomeno, ol al la internaj lingvaj procesoj.

Cl.- Interlingua naskiĝis de vortarego, frukto de longjara studado far la funkciuloj de **I.A.L.A. (International Auxiliary Language Association)**. Alexander Gode kaj Hugh E. Blair, du lingvistoj, eldonis en 1951 gramatikan sistemon, kiu estas submetata al tiu vortarego. Tiel naskiĝis Interlingua.

A.- Dum en esperanto la vortaro estas submetata al la gramatiko, en Interlingua estas ekzakte la kontraŭo : la gramatiko estas submetata al la vortaro. Kaj ĉar tiu vortaro estas ĉefe latinida, la gramatiko aŭtomate estas latinida.

Cl.- La lingvo konas fleksiojn kiel la franca. Ni reprenu la ekzemplon **Paŭl kritikas Karlon**.

A.- Kiel diri tion en Interlingua ?

Cl.- **Paul critique Karl**.

A.- Kaj nun kiel oni diras **Li kritikas Karlon** kaj **Paul kritikas lin**.

Cl.- **Ille critique Karl** kaj **Paul le critique**.

A.- Ĉio, kion ni diris por la franca lingvo, konvenas al Interlingua. La pronomo **ille** fariĝas **le** en la akuzativo. Tiam por eviti konfuzon kun **le**, la difina artikolo, ĝi estas metata antaŭ la verbo.

Cl.- La simileco inter Interlingua kaj la franca estas kvazaŭ absoluta por la personaj pronomoj. En la unua kaj dua personoj de la pluralo oni ne distingas la akuzativon de la nominativo, **ni** kaj **nin** estas **nos**, **vi** kaj **vin** estas **vos** pro la francaj **nous** kaj **vous**, kie akuzativo ne estas distingata de la nominativo.

A.- La esperantistoj miras pri tio, ĉar ili ĉefe vidas la gramatikan fenomenon. La adeptoj de la naturalismo vidas en tiu simileco kun la franca kaj aliaj latinidaj lingvoj la pravigon de la realeco de sia vidpunkto.

Cl.- Kiel Zamenhof ni pensas, ke sole la vivo decidis, kaj ke ĝi decidis por la lingvo, kiu estas plej konforma, ne al la ekstera efemera vortara realeco, sed al la interna psikologia realeco de la homa pensado.

A.- Kio estas nova kun Interlingua kaj permesas interesan konfrontadon, tio estas, ke tiu lingvo posedas veran fundamenton en la vortaro de I.A.L.A., dum ĝiaj antaŭuloj senĉese evoluadis.

Cl.- Lingve tiu konfrontado nur povos esti pozitiva, ĉar ĝi ebligas lumigi punktojn ofte neatentatajn. Sed tiu konfrontado devas okazi inter fakuloj, kaj ne sur publika placo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-